

La Kalumeto

la bulteno de «Projekto Indiĝenaj Popoloj »
januaro-marto 2013

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Projektoj kaj politikoj ĉe Unesko

Jen traduko de la anglalingva parto de la prelego kiun Irina Bukova, Ĝenerala Direktoro de Unesko prezentis la 10-a de decembro 2012, okaze de la sesa sesio de la Interregistara Komitato pri la Gardado kaj Antaŭenigado de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj.

Gesinjoroj,

Ni altigis esperojn tra la mondo kaj kun ĉiuj partoprenantoj. Sed ni devas daŭrigi la impeton. Precipe, ni devas ligi niajn fortojn por maksimumi niajn penojn pri mono-provizado kaj por doni al la Internacia Fonduso por Kultura Diverseco la financon subtenon kiun ĝi meritas. Pro tio, gravegas ĉi tiu sesio de la Interregistara Komitato por la Gardado kaj Antaŭenigado de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj. La decidoj kiujn vi faros rilate la subtenon de 13 novaj projektoj disvolvos politikojn, merkatojn, kaj trejnado-okazojn por certigi ke en evoluantaj landoj ekzistos loka konceptado, posedado, kaj administrado de kulturaj industrioj.

Rilate tion, mi laŭdas la projekton «Unesko/EU,» kiu provizas helpon al 13 landoj—ĉi tiu projekto kreis novajn labormanierojn per kiuj daŭrigi la evoluadon de landa leĝodonado kaj politikoj por subteni tie kreemajn industriojn. Kiel plia disvolviĝo de tiu projekto, ni starigis novan prov-programon. La programon en Afriko, kiun mi subtenis ankaŭ per la Kriz-Fonduso. La programo havas du celojn: subteni novan generacion de tiea sperteco pri kulturaj strategioj kaj profundigi sud'-al-sudan kunlaboron. Fakte, ni montras per nia tuta laboro ke ĉiu lando povas disvolvi dinamikajn kultur-sektorojn, sed ĝi bezonas la ĝustajn politikojn por tion fari.

Mian specialan dankemon mi esprimas al anoj de la Eŭropa Unuiĝo. La Eŭropa Unuiĝo multe utilis pri la adopto de la Universala Deklaro pri Kultura Diverseco de 2001, kiu unuafoje deklaris ke kultura diverseco estas fonto de kreemo. La Unuiĝo helpis ankaŭ pri la faciligado de la adopto de la konvencio de 2005. Aparte plaĉas al mi diri tion je la tago kiam la Eŭropa Unuiĝo ricevas la Nobelan Pac-premion por pli ol ses jardekoj de laboro por antaŭenigi pacon kaj akordigadon, demokration, kaj homrajtojn en Eŭropo.

Ni antaŭenirigas la certigadon de la rekono de la potenco de kulturo, sed mi kredas ke ĝia plena potenco estas ankoraŭ sen elĉerpado. Ni povas fari pli por jungi la kapablon kiun kulturo posedas por helpi la sociojn kreski preter krizoj, plifortigi sian koheron, kaj firmigi la fundamenton por daŭra paco. Tio estas la decido kiu kunsidigas nin hodiaŭ.

Kulturo funkcias. Nia laboro estas certigi ke oni agnosku tion, kaj ke ni plu konstruu baze de instigaj faritaĵoj por montri ke investado je kulturo kaj kreemo donas rezulton. Je tiu spirito, gesinjoroj, estas por mi granda plezuro ĉeesti la sesan sesion de la Interregistara Komitato por la Gardado kaj Antaŭenigado de la Diversco de Kulturaj Esprimo

Mi dankas vin.

Neformalaj nomoj /hejmnomoj

Notindas en la lingvoj de Etiopio nova kaj interesa kutimo rilate nomojn. Tradiciaj neformalaj nomoj ("hejmnomoj") en Etiopio ofte celas esprimi bondezirojn, amon, aŭ fortodonon. Ankaŭ ili ofte estas longetaĵoj. Ekzemploj estas: "Jene Geta" (Mia Sinjoro), "Jene Geŝa" (Mia Ŝildo), kaj "Jene Ŝega" (Mia Belulino).

Tamen, dum pli antaŭnelongaj jaroj, okazis ŝanĝoj pri tiu kutimo. La nunaj hejmnomoj estas ekzemple, "Mitu," "Tuti," "Ĉuĉu," "Ŝeet" (angla-lingve "dolĉa"), aŭ "Amen" ("tiel ĝi estu"). Verŝajne, tiu kutimo de hejmnomoj mallongaj kaj sensignifaj aŭ intimsignifaj kaj la kutimo de silaboripetado iris al Etiopio kun la multaj alilandanoj kiuj iris al tiu lando por komerci, instrui, (En Etiopio, la kutimo de ripetado de silabo por krei hejmnomon estas nova, kvankam ĝi estas malnova en la angla, la finna, la ĉina, la maoria, kaj pluraj aliaj lingvoj.)

Mi petas ke legantoj raportu pri neformalaj nomoj en indiĝenaj lingvoj konataj de ili, aŭ tiaj nomoj uzataj en la propraj (unuaj) lingvoj.

(Informofonto: "The World" (La Mondo), radiofonia novaĵprogramo de Public Radio International (Publika Radiofonio Internacia), 2012)

Kion li/ŝi diras?

Patrick Cox, profesia lingvemulo kaj blogisto en Usono, komentis ĉe "The World" [La Mondo] de Public Radio International ke antaŭ elekto antaŭnelonga en Ganao, oni dissendis debat-programojn dum kiuj la debat-lingvo estis la angla. Tio ŝajnis stranga al s-ro Cox, ĉar en Ganao, proksimume 20% el la loĝantaro sufiĉe bone scipovas la anglan por povi kompreni la signifon de la debatotemoj. Unu rezulto de tiu situacio estas ke oni postulas ke debatoj okazu per pli vaste komprenata (t. e. loka) lingvo.

Demando kiun s-ro Cox ne faris estas "Kial iu partoprenus televide spektatan debaton per lingvo ne vaste komprenata de la voĉdonantoj?" Ĉu la politikistoj deziris identigi sin kun pli-malpli-a internacieco de la angla? Ĉu ili deziris aperi ĉe debato sen vere klarigi siajn politikojn per facile komprenebla lingvo? Mi ne povas trovi pozitivan kialon por la uzado de malvaste konata lingvo dum naciskala evento.

Ĉu iu afrika leganto deziras forpreni mian nekomprenon?

La silento laŭtas—ankoraŭ

Ankoraŭ ni sentas la mankon de la muzikistoj de Malio, precipe en norda Malio, nun sub la influo de “Alkejda,”* ekstrema islama organizo kiu mal-akceptas la kantadon kaj ludadon de la plejparto de la muziko.

Kiel estas lingvoj, la pluraj formoj de la muziko estas netuŝeblaj heredaĵoj, ĉu en Malio, ĉu en aliaj partoj de la mondo aŭ aliaj kulturoj. En la diversaj regionoj de Malio, muziko kutime aŭdiĝas ĉe ĉiu ceremonio de naskiĝo, cirkumcido, geedziĝo, kaj propluva preĝado. Krome, la “griotoj,” aŭ bardoj, kantis la historiojn de reĝoj kaj herooj. En moderna Malio, oni kantis pri homaj rajtoj, kondutomoroj, kaj aktualaj sociaj problemoj.

La nuna situacio en norda Malio estas tiel ke muzikistoj suferas, perdas siajn muzikilojn, kaj devas eĉ foriri Malion. Ne plu ekzistas la fama “Burning Man” (Brulanta Viro)-festivalo; tio altiris turistojn al Malio kaj mondfamigis malian kulturon, historian, kaj aktualajn muzikartistojn.

Malia kantistino deklaris ke nokte, post fermi la domofenestrojn, ŝi zumas siajn kantojn, ĉar “nur per muziko mi povas transvivi ĉi tiun koŝmaron”.

(*Kiu povas informi nin pri la ĝusta vorto por esprimi “Alkejda”?)

(Informfontoj: Diversaj)

Manĝaĵ-programo en Meksiko

Je januaro 2013, Enrique Peña Nieto, prezidento de Meksiko, starigis programon por provizi manĝaĵojn al homoj kaj gentoj en tiu lando kiuj urĝe bezonas manĝaĵo-helpon. Li agis akorde kun la programo de la ONU kiu nomiĝas “Nula Malsato.” Prezidento Peña Nieto deklaris ankaŭ ke li antaŭnigos daŭrigeblajn sistemojn por tieaj manĝaĵ-produktistoj. Celata regiono estas la ŝtato Chiapas. Celata Indiana gento estas la Tarahumara-gento. Laŭ la cifroj de la registaro de Meksiko, el la tutlanda loĝantaro de 112 milionoj, 11.7 milionoj estas ekstreme malriĉaj, kaj 7.4 milionoj alfrontas subnutradon.

La malinstigaj (sed sciindaj) cifroj pensigas interesulojn pri la Jarmilaj Celoj pri Disvolviĝo de la ONU, kiuj estas nur parte atingitaj en la plimulto de la evoluantaj landoj. Inter la tre bazaj kaj tre gravaj celoj estas la forigado de ekstrema malriĉeco kaj de subnutrado. La Jarmila Deklaro, kiun subskribis 147 registar-ĉefuloj (en 2000, ne coincide), emfazas ke indiĝenaj gentoj rajtas ricevi aŭ travivi avantaĝojn kaj helpon rezulte de la Jarmilaj Celoj kaj, inter tiuj gentoj kaj gentanoj, precipe la virinoj.

Aparte interesa pri la celoj kaj celatingoj de la programoj de la ONU estas la koncepto ke indiĝenaj popoloj rajtu provizi la proprajn definojn pri “malriĉeco” kaj “disvolviĝo,” kaj ke ili ankaŭ rajtu plene partopreni je la efektivigado de la celoj. La cifroj kaj novaĵoj pri la aktuala(j) situacio(j) en Meksiko atentigas nin denove pri la nur parta sukceso de la Jarmilaj Celoj pri Disvolviĝo.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri indiĝenaj aferoj certe komprenas aŭ penas kompreni kiel forta bezono en regiono aŭ gento malinstigas aŭ malebligas la antaŭenportadon de

gravaj scioj, konoj, lingvoj, tradicioj...kaj de aliaj heredaĵoj.

(Informofontoj: The Associated Press, 2013 januaro 21, kaj UN Chronicle, numero 1, 2008.)

Avantaĝoj modernaj kaj tradiciaj

La fama verkisto Jared Diamond, en sia nova libro *The World Until Yesterday** (2012), komentas pri la rilatoj inter la tradicia kaj la moderna mondoj. Librofine li faras liston de avantaĝoj de la du mondoj. Jen kelkaj:

Avantaĝoj de la moderna vivo:

- diversaj kaj utilaj varoj ka iloj
- pli bonaj eduko kaj postenoj
- pli bonaj hospitaloj kaj kuracistoj
- pli da persona sekureco kaj malpli da perforto
- pli da sekureco pri manĝaĵoj
- pli longa vivado

Avantaĝoj de la tradicia vivo:

- malpli da soleco, pli da familia vivo kaj socia vivo, pli da kundividado
- pli da libereco por infanoj, ekzemple vizitado kun najbaroj kaj ludado sen adolta atentado
- pli malrapida vivostilo
- konado de diversaj lingvoj kiel kutima ero de la vivo.

Plena titolo: *The World Until Yesterday: What Can We Learn from Traditional Societies?* [La Mondo ĝis Hieraŭ: Kion Ni Povas Lerni de Tradiciaj Socioj?]

Sunsubira lumo

(Rakonto de la Jurok-indianoj de Usono pri viro kiu, pro sia purkoreco, povus vidi la verdan brillumon je la momento de sunsubiro.)

La viro P-a estis la plej aĝa filo de la ĉefulo de la saal-a vic-gento. Ĉiuj el liaj samvicgentanoj rimarkis la gentilecon kaj neofendemon de la filo. Ĉiun tagon P-a iris al la plaĝo por fari sian sunsubiran preĝadon. Unu tagon li vidis la verdan lumon kiu videbliĝas ĉe sunsubiro kaj kiu montras la energion de la spirito kiu okazigis la kreadon de la mondo.

Post kiam P-a vidis la verdan lumon, li daŭre staris ĉe la mar-rando. Tra la mezlumo li ekvidis blankan fiŝon kiu naĝis apud li. Dum li rigardis, la fiŝo iĝis blankhaŭta virino. Ŝi elmariĝis kaj staris apud P-a.

La blanka virino diris al li ke la pureco de liaj preĝoj altiris ŝin, kaj ke ŝi venis por kontentigi lian kordeziron. P-a kaj la blanka virino kune faris ĉe-plaĝan loĝejon kie ili

geedziĝe kunfandis siajn spiritojn.

La postan tagon, P-a kaj la blanka virino vizitis la edzan patron por informi lin pri tio kio okazis. La gepatroj ege ĝojis, kvankam ili komprenis ke ili neniam vidos siajn nepojn; pro la okulvunda brilhaŭteco de la naskiĝontaj infanoj, P-a kaj lia familio devos loĝi ĉe la alia bordo de la maro por ke la infan-naskiĝoj ne blindigu iun ajn.

Kiam okazis la sunsubiro, la du geedzaj paroj iris al la plaĝo. Dum la gepatroj de P-a rigardis, la blanka virino refiŝiĝis kaj tiel povis porti na P-a je la direkto de la sunsubiro. Kiam ili tien vojaĝis, la tuta ĉielo pleniĝis je la verda lumo kiu honoras la mondokreadon.

Kiam homoj nun vidas tiun verdan lumon, kelkaj scias ke ili rigardas la saluton kiun P-a ankoraŭ sendas al siaj gepatroj.

(Informofonto: Neŭs from Native California [Novaĵoj de indiĝena Kalifornio] vintro 2012/2013.)

Fajro, plumoj, kaj konkoj

En Peruo, Kolombio, kaj Brazilo loĝas la tikun-gento, kies kulturo inkluzivas adoltigan ceremonion por knabinoj kiuj ekmenstruis. La komplekseco kaj longeco de la ceremonio indikas ĝian gravecon en la kulturo. Ankaŭ, ĝi estas bela ekzemplo de heredaĵo kaj tuŝebla kaj netuŝebla.

Tuj post la unua menstru-okazo, oni izolas la menstruintinojn kaj instruas al ili pri la historio kaj ritoj de la gento. Kiam la izoloperiodo finiĝas (post eĉ pluraj monatoj), la ĝenerale videblaj eroj de la ceremonio okazas.

Oni farbas la korpojn de la knabinoj per nigra plantosuko kaj senhargas ilin. Poste, oni ornamas la knabinojn per agloplumoj kaj helikokonkoj. (La konkoj simbolas fekundecon.) Poste, la knabinoj devas pasigi kvar tagojn sen dormi dum samgentanoj batas tamborojn kaj kantas. Ankaŭ, la knabinoj devas multfoje transalti kampofajron, kun saltohelpo de viroj kiuj levetas kaj stabiligas ilin, ĉar ili devas salti dum ili uzas okulkovrajn kapornamojn. Estas ankaŭ periodo dum kiu la knabinoj dancas kun maskoportantaj “monstroj” por indiki ke ili povas trakti kun la respondecoj kaj riskoj de plenkreskuleco. (Pri la monstroj kaj danĝeroj ili jam lernis de la instruistinoj kiuj vizitis ilin dum ilia izoleco.)

Dum la lasta paŝo de la ceremonio, samvilaĝanoj portas la knabinojn, ĉiu kun bebo de iu vilaĝanino, al lago aŭ rivero. Tie oni metas la knabinojn kaj la bebojn en la akvon; tio “purigas” la knabinojn por ke ili povu vivi kiel adoltoj kaj ekuzi adoltstilajn vestojn.

Kvankam la ritaro ŝajnas drasta kaj eĉ senorientiga, la knabinoj estas ĉiam kun samvilaĝanoj, kaj ili vidis la samajn ritojn antaŭe, kiam pli aĝaj knabinoj trapasis ilin. Tiel ili scias ke ege gravas ke ili transsaltu la fajron kaj dancu kun la monstroj de siaj estontecoj.

(Informofonto: “Ticuna Rites of Passage” [Tikuna adoltig-ritaro] de Dan James Pantone, Ph.D., ĉe “Amazon-Indians.org.”)

La ŝtonaj fratinoj

El aborigena Aŭstralio venas rakonto de tri fratinoj kiuj estis anoj de la katumba gento. La fratinoj enamiĝis je tri fratoj de la nepeana gento, kiuj estis malpermesataj al ili. La fratoj malakceptis la intertriban leĝon kaj penis forkapti la fratinojn; tiu ago kaŭzis intertriban batalon.

Kiam la vivoj de la fratinoj endanĝeriĝis pro la batalo, ŝamano de la katumba gento sorĉe ŝtonigis la fratinojn por protekti ilin. La ŝamano intencis rehomigi la virinojn kiam la batalo iĝos malpi danĝera, sed oni batalmortgis lin antaŭ kiam li povos fari tion. Pro tio, en la aŭstrala ŝtato Nova Sud-Kimrio [New South Wales] staras ankoraŭ rokegoj kiuj nomiĝas “La Tri Fratinoj.”

Estas interese ke en ĉi tiu rakonto, la ŝamano ne kapablas tute savi la fratinojn; ili ne vundiĝis kaj ne mortis laŭ normalaj konceptoj de vivo kaj morto, sed ankaŭ ili ne normale vivas (kaj certe ne edziniĝas). Tiel ni rimarkas ke en Aŭstralio oni ne prezentas ŝamanojn kiel ĉiosciajn.

“Furioze defendema...”

El Walking the Amazon [Tramarŝi la Amazonon] de Ed Stafford (2011)

(S-ro Stafford pripensas okazon kiam aŝanikaj indianoj humilige devigis lin foriri sian vilaĝon.) “La postan tagon, Oscar kaj mi retrovojaĝis al Satipo, kie Emily montris al ni mapon kiu videbligis ke la tut-tuto el la perua amazona regiono (krom malmultaj regionetoj) nun asigniĝas por la naturrimeda ekspluatado. Miriga leĝo deklaras ke peruanoj posedas siajn terenojn nur ĝis la profundeco de kvin metroj. La registaro povas vendi la bor-raĵojn pri la tereno sub la aŝanika rezervejo al internaciaj firmaoj, kaj la indianoj ne povas efike kontraŭdiri tion. Tio ĵus okazis ĉe la Rivero “Ene.” Kontraŭ tio la komunumoj defendis sin. Mi ne povis resti neŭtrala—kvankam la aŝanik-gentanoj foririgis min, mi tute komprenis la kialon, kaj mi komencis egi admiri ilian furioze defendeman spiriton.”

“Kantoj estas pensoj....”

“Kantoj estas pensoj, spirade elkantitaj kiam oni estas kortuŝita de grandaj potencoj, kaj ordinara parolado ne plu sufiĉas. Homoj moviĝas kiel bankizero kiu flosas diversdirekte laŭ la marfluo. Flupotenco pelas la pensojn de la homoj kiam ili sentas ĝojon, kiam ili sentas timon, kiam ili sentas malĝojon. Pensoj povas superflui ilin kiel inundo; tiam, la spirado estas anheleca kaj la koro bategas. Estas io, kiu similas al degelo; kiam homoj travivas tion, ni sentas nin eĉ pli malgrandaj ol antaŭe. Ni timas uzi vortojn. Sed okazos ke la vortoj kiujn ni bezonas venos al ni porpravole. Kiam subite aperas la vortoj kiujn ni bezonas, ni ricevas novan kanton.”

Orpingalik, netsilik-inuito, citita de Knud Rasmussen, dana atropologo kaj ekspedicianto kiu aktivis inter la inuitoj en la 1920-aj jaroj.

Fajro-saltado, leĝodonado, verda lumo, subnutrado, marfluo, debatoj...

La vivo estas tre interesa, ĉu ne? Kaj ĝi iĝas eĉ pli interesa kiam vi respondas al artikoloj, rakontoj, kaj poemoj en La Kalumeto, kaj eĉ PLI interesa kiam vi kontribuas artikolojn kaj similaĵojn al la bulteno.

Projekto Indiĝenaj Popoloj

ĉe Erik Felker (Usono), ejfelker@dslextreme.com